

ESPERANTOLEHTI


Esperanta Finnlando

Esperantobladet

Kesäkuu ♦ Junio

3/1999

Belan someron al ĉiu leganto!



Hemmo Tietti forpasis, p. 3

Eventa Södergran-esperantigo, p. 6

Ilmoittaudu heti syyspäiville, s. 17-18

Esperantolehti

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: *Aimo Rantanen*

PL 2, 40801 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ esperantolehti@esperanto.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 80 mk/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroy: 60 mk; Baltio 60 mk, aliaj landoj 80 mk.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmögatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Postisiirtotili/Postgirokonto/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; (050) 5829 248; työ/laboro: (03) 249 4313

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Jukka Pietiläinen*

Nyyrikintie 4 H 47, 33540 Tampere. ☎ (03) 261 7871 ✉ jukka.pietilainen@esperanto.fi

Sekretario/Sihteer: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Anna-Liisa Ali-Simola, Friskinkatu 2 A 33, 20360 Turku. ☎ (02) 238 7767

Kimmo Hakala, 72300 Vesanto. ☎ (017) 648 831 ✉ khakalat@nettilinja.fi

Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609

Anna Ritamäki, Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ aritamak@ra.abo.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Jussi Jäntti, Retkeilijantie 5 B 14, 70200 Kuopio. ☎ (049) 859 641

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (03) 348 4245

Ritva Sabelli, Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 635 902 ✉ ritva.sabelli@sfs.fi

Rahastonhoitaja/Kasisto: *Antti Mikkola*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ antti.mikkola@orion.fi

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Toimisto/Oficejo: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

UEA:n pääedustaja / Ĉefdelegito de UEA: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ ☎ (09) 275 5528

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Hemmo Tietti (Helmuth Dibelius)

23.12.1911-20.5.1999

Enirante al floranta somertempo ja unuaj veraj varmegoj venis mesaĝo pri forpaso de unitara pastro kaj personeca E-eminentulo Hemmo Tietti. Li vere unuigis nin, finnlandajn esperantistojn, ĝis lia mal-saniĝo, ĉar ĉiu el ni, nedepende de tio, kie ni loĝas en Finnlando almenaŭ unu fojon renkontis Hemmon. Kaj oni povas diri, ke li konis ĉiun finnlandan esperantiston.

Esperantolehti honoras la forpason de sia multjara helpanto kaj ideiganto per publikigo de nekrologo, kiun verkis Heta Kesälä:

“Nia amiko Hemmo Tietti ne plu estas inter ni surtere. Li estis germano, kun origina nomo Helmuth Dibelius. En Finnlandon li venis dum la dua mondmilito. Jam tiam li estis esperantisto kaj post la milito li venis al Somero, kie mi frekventis la lernejon Someron Yhteiskoulu. Ties rektoro estis alia esperantisto, nome Joel Vilkki.

Unua fojon mi vidis lin kiel instruiston de Esperantoleciono. Tion mi ne plu klare memoras. Komence de 50-aj jaroj (1950-51) lia edzino Veera estis instruistino en nia hejmvilaĝo Kaskisto. Lia vivmaniero tre mirigis la vilaĝanojn – li i.a. promenis nudpiede dum la tuta jaro, ignorante mir-ojn, ridetojn kaj mokojn. Ekde tiam mi memoras lin kiel “elstaran fenomenon”.

Poste pasis jaroj sen pluaj rilatoj kun li kaj la familio. Intertempe lia nomo estis finnigita: Hemmo Tietti. En la familio estis ankaŭ filino Silja kiun mi unuafoje renkontis dum la oficiala malferma tago de la 54-a UK en Helsinki kun la patrino Veera kaj kiu, cetere, salutis en 1977 en la nomo de EAF en Rejkjaviko.

Post partopreno en du UK-oj mi konatiĝis kun finnlanda Esperanto-movado en 1972. Ekde tiam mi pli bone konis lin: fidedela, modesta, fervora kaj obstina Esperantisto.

Filino Silja forpasis en 1980 kaj la edzino Veera en 1990. Poste li vivis sola en Somero, sed havis multajn amikojn dise en la mondo, plej proksimajn en Togolando kaj Rumanio. Li estis modele aktiva membro en Esperanto-movado, kun ideoj kaj necesaj kritikoj. Lastan fojon li partoprenis Esperanto-okazon 1997 en Somero-regiono.

Kutime mi sendis al li salutojn okaze de Universalaj Kongresoj, li kutime dankis letere. Lastan leteron mi ricevis komence de februaro kun lastaj vortoj: “per-pense ankaŭ vin mi sentas proksima, vi restas tia bona amikino, kia vi estis jam antaŭ jardekoj. Fidele: Via Hemmo.” Nun mi adiaŭas Vin kun forta sento de danko pro Via bona agado esperanta kaj humana. Ripozu bone.

*Kun varmaj rememoroj,
benante vian pluvojon:
Heta Kesälä”*

Pushkinin 200-vuotisjuhlavuosi

Venäjän kansallisrunoilija Aleksander Pushkin syntyi toukokuun 27. päivänä (juliaanisen kalenterin mukaan 6.6) 1799 ja kuoli vain 37-vuotiaana kaksintaistelussa vuonna 1837 puolustaessaan vaimonsa kunniaan. Tuohon lyhyeen elämään kuitenkin mahtui valtavan kirjallisen tuotannon luominen. Venäjällä kansallisrunoilija Pushkinia on juhlittu tänä kesänä innostuneesti. Pushkinin tuotantoa on luettu televisiossa, radiossa ja lukuisissa tilaisuuksissa. Pushkinin kuvaa on painettu julisteisiin, tulitikkurasioihin ja luottokortteihin.

Myös Suomessa osallistutaan Pushkinin

juhlintaan. Kuopion kaupunginkirjastossa on avattu Pushkin-näyttely. Esperantoksi Pushkinia on käännetty Antoni Grabowskin (1857-1921) ”La neĝa blovo” -käännöksestä lähtien säännöllisesti. Viimeksi Lappeenrannan Syyspäivillä Mikaelo Bronštejn esitteli Pushkin-esperantonnoistaan. Jyväskylässä järjestettiin kesäkuun alussa ystävyysseurojen soudut Aleksandr Pushkinin juhluvuoden kunniaksi. Erkki Peuranen, Jyväskylän yliopiston slavistiikan laitoksen professori, on laatinut seuraavan esittelyn Venäjän kansalliskirjailijasta soutu-kutsukirjeen oheismateriaaliksi.

Aleksandr Pushkin (1799-1837) 200 vuotta

Venäläinen kirjailija, venäläisen kirjallisuuden klassikko ja Venäjän kansallisrunoilija

Pushkinilla oli äidin puolelta afrikkalaista verta: hänen esi-isänsä oli Pietari Suuren aikaan Venäjälle tuotu abessinialainen. Kirjailija kuvaa äitinsä isoisää keskenjääneessä romaanissaan Pietari Suuren murjaani. Pushkinit olivat vanhaa aatelissukua, jonka vaiheisiin runoilija useissa teoksissaan ylpeänä viittaa. Pushkin opiskeli 1811-1817 aatelinuorukaisille perustetussa Tsarskoje Selon lyseossa, josta siirtyi ulkoasiainkollegion palvelukseen. Opiskeluaikoinaan hän tutustui venäläisen romantiikan johtajiin Zukovskiin ja Batjushkoviin, jotka vaikuttivat hänen varhaistuotantoonsa. Vuonna 1820 hän julkaisi läpimurtorunoelmansa ‘Ruslan ja Ljudmila’.

Pietarista hänet karkoitettiin poliittisten runojensa ja haastavan elämäntapansa vuoksi Etelä-Venäjälle Kishineviin, Odessaan ja lopuksi maatilalleen Mihailovskojeen Pihkovan lähelle. Karkoituksensa aikana Pushkin julkaisi runoelmat ‘Kaukasian vanki’ (1821), ‘Bahtshisarain suihkulähde’ (1823) ja ‘Mustalaiset’ (1824), joissa hän koettelee eksoottisessa ympäristössä romanttisia ideoita ja niiden elinkelpoisuutta. Odessassa hän aloitti runomuotoisen romaanin ‘Jevgeni Onegin’ (1823-1830), jota näytelmän ‘Boris Godunov’ (1825) ohella pidetään venäläisen realismin alkuna. Nikolai I:n vapautettua Pushkinin karkoitustuomiosta tämä asettui Pietariin, jossa hän osallistui kirjalliseen toimintaan myös sanomalehden julkaisijana.

*Runoilijan omakuva, joka on julkaistu Pushkinin kootujen teosten 18. osassa (Moskova 1997). Tätä ja muita Pushkinin omakuvia eri vuosilta on käytetty kuvituksena myös äskettäin ilmestyneessä professori Erkki Peurasen kirjasessa *Aleksander Pushkin, venäläinen maailmankirjailija*.*



Pushkinin viimeiselle kaudelle on ominaista syventynyt realismi, joka ammentaa aineksensa historiasta, kansanelämästä sekä runoilijan ja vallan välisistä suhteista. Pushkin antaa monipuolisen kuvan venäläisestä ihmisestä, hänen historiastaan ja arkielämästään runoelmissa ‘Pultava’ (1828), ‘Talo Kolomnassa’ (1830) ja ‘Vaskiratsastaja’ (1833) sekä proosateoksissa, joita ovat ‘Dubrovski’ (1832-1833), novellikokoelma ‘Edesmenneen Ivan Belkinin kertomuksia’ (1830) ja romaanit ‘Patarouva’ (1833) ja ‘Kapteenin tytär’ (1836). Viimeisinä elinvuosinaan hän kirjoitti historiateoksen ‘Pugatshevin kapinan historia’ (1834) ja ryhtyi valmistelemaan Pietari Suuren historiaa, joka jäi kesken runoilijan kuollessa kaksintaistelussa. Hänen myöhäisrunoutensa vetää vertoja hänen romanttiselle lyriikalleen ja jopa ylittää sen.

Pushkinin historiallinen merkitys nykyvenäjän kirjakielen ja nykyaikaisen kirjallisuuden perustajana on kiistaton. Suuri osa Pushkinin proosatuotannosta on suomennettu, monet hänen runomuotoisista teoksistaan tunnetaan niiden pohjalta sävellettyjen musiikkiteosten (esim. Tshaikovskin oopperat Patarouva ja Jevgeni Onegin sekä Musorgskin ooppera Boris Godunov) libretoista. Pushkinin epistolaarinen (kirje-) ja lyyrinen tuotanto sekä hänen keskenjääneet proosateoksensa odottavat edelleen suomentajaansa.

Erkki Peuranen

<http://www.online.ru/sp/eel/russian/Pushkin.Alexander>

Eventa Södergran-esperantigo

*Edith Södergran,
Lando malekzista.
Traduko: D-ro Sabira Ståhlberg
N-ro 2 de Serio Kargo
Bambu Ltd, Varna 1999
ISBN 954-9637-05-0*

En Finnlando ekzistas 3 endaj verkistoj, al kiuj oni kolizias en lernejo, en universitato kaj dum ebla verkista kariero. La verkoj de Aleksis Kivi estas laborenkonduko por dramistoj kaj prozistoj. Pri la "Helkavirsiä" de Eino Leino kaj pri liaj aliaj verkoj multaj esploristoj pri la finna literaturo komencis kaj finis siajn studojn. Multaj tradukistoj kaj poetoj finnaj aŭ finnlandsvedaj komencis sian vojon al profesia matureco el poemoj de Edith Södergran.

Vierge moderne

*Jag är ingen kvinna. Jag är ett neutrum.
Jag är ett barn, en page och ett djärvt beslut,
jag är en skrattande strimma av en
scharlakansol...*

*Jag är en nät för alla glupska fiskar,
jag är en skål för alla kvinnors ära,
jag är ett steg mot slumpen och fördärvet,
jag är ett språng i friheten och självet...
Jag är blodets viskning i mannens öra,
jag är själens frossa, köttets längtan och
förvägran,
jag är en ingångsskylt till nya paradiser.
Jag är en flamma, sökande och käck,
jag är ett vatten, djupt men dristigt
upp till knäna,
jag är eld och vatten i ärligt sammanhang
på fria villkor...*

Edith Södergran 1916, originalo

Tion faris ankaŭ d-ro Sabira Ståhlberg, kvankam ŝi estas jam sperta verkisto, tradukisto, esploristo kaj ĵurnalisto. La efikon de traduko "Lando malekzista" mi volonte komparas al Södergran-traduko de finna poeto kaj tradukisto speciale el latinidaj lingvoj Pentti Saaritsa, kies Tulevaisuuden varjo ("Ombro de la estonteco")-finnigo estis eksignalo por tuta literatur-generacio kaj Södergran-renesanco en finningva Finnlando.

Mi komparis hazarde selektitan poemon "Vierge moderne" el originalo kaj tri tradukoj por trovi specialajn trajtojn de ĵus aperinta "Lando malekzista" de Sabira Ståhlberg:

Vierge moderne

*Mi ne estas virino. Mi estas neŭtro.
Mi estas infano, paĝio kaj brava decido,
mi estas ridanta stri' de skarлата suno...*

*Mi estas reto manĝavidaj fiŝoj,
mi estas tosto je virina honor',
mi estas paŝo al hazardo kaj perejo,
mi estas salto en liberon kaj memon...
Mi estas flustro de l' sango en virorelo,
mi estas anima febro, sopiro karna kaj ĝia neo,*

*mi estas vojmontrilo al novaj paradizoj.
Mi estas flamo, serĉanta kaj brava,
mi estas akvo, profunda sed aŭdace ĝisgenua,
mi estas fajro kaj akvo en honesta kunligo
sendevige...*

Sabira Ståhlberg 1999, traduko en Esperanton

Vierge moderne

*En minä ole nainen. Olen neutri.
 Olen lapsi, hovipoika ja rohkea päätös,
 olen naurava häive helakanpunaista aurinkoa...
 Olen kaikkien ahnaitten kalojen verkko,
 olen malja kaikkien naisten kunniaksi,
 olen askel kohti sattumaa ja perikattoa,
 olen hyppy vapauteen ja omaan itseen...
 Olen veren kuiske miehen korvassa,
 olen sielun vilu, lihan kaipuu ja kielto,
 olen uusien paratiisien portinkilpi.
 Olen liekki, etsivä ja röyhkeä,
 Olen vesi, mutta uskalias, polviin saakka,
 olen tuli ja vesi rehellisessä yhteydessä,
 ilman ehtoja...*

Pentti Saaritsa, 1972, traduko en la finnan

Vierge moderne

*I am no woman. I am a neuter.
 I am a child, a page-boy, and a bold decision,
 I am a laughing streak of an scarlet sun...
 I am a net for all voracious fish,
 I am a toast to every woman's honour,
 I am a step toward luck and toward ruin,
 I am a leap in freedom and the self...
 I am a whisper of desire in man's ear,
 I am soul's shivering, the flesh's longing and denial,
 I am entry sign to new paradises.
 I am a flame, searcing and brave,
 I am water, deep yet bold only to the knees
 I am fire and water, honestly combined,
 on free terms...*

Stina Katchadourian, 1992, traduko en la anglan

La tri tradukoj estas tre unuecaj je vidpunkto de vort-pro-vorteco. Eĉ Pentti Saaritsa ne deflankiĝas je tio, kvankam oni atendus de li kiel poeto ian liberecon. Kiel svedlingvano Sabira Ståhlberg tradukas "själens frossa" de la originalo kiel "anima febro", kiam Saaritsa parolas pri "sielun vilu". La traduko de tio kiel "shivering" de Stina Katchadourian, kiu ankaŭ estas originale finnlandsvedo, estus plej proksima al la originalo, nome "frossa" estas en la finna lingvo "horkka". Se la tradukinto parolas la fontlingvon kiel la gepatra, tio helpas al profunda kaj nuanca cellingva traduko.

La originalo kaj la traduko de Katchadourian havas kiel la unua verson "Jag är ingen kvinna", "I am no woman". Sed Ståhlberg kaj Saaritsa havas kiel komenco "Mi ne estas virino", "En minä ole nainen". Saaritsa akcentas la pronomon "mi", Ståhlberg la

verbon "estas" Katchadourian kaj Edit Södergran akcentas la vorton "virino". Mi volas interpreti la pronomon "ingen" en la originalo per parafrazo "mi ne estas kiel virinoj kutime estas atenditaj konduti".

Oni diras per frazo 'Li estas neniu viro' pri viroj kiuj ne kondutas kiel viroj kutime. Oni povus eĉ skribi "ne virino" kiel "ne-virino" aŭ "nevirino" por trovi kompromison inter originalo kaj tradukoj, "Mi estas ne(-) virino. Mi estas neŭtro". Tian tradukon uzus persono kiu tute kontraŭas ĉiujn estimojn je sekso. Kiel oni povas el antaŭaj notoj vidi, el la esperantigo de D-ro Sabira Ståhlberg preciza leganto trovas multon por interpretado. Tio estas bona signo, ĉar tio signifas, ke la "Lando malekzista" estos legata eĉ jardekojn post nuntempo.

AR

Ĉu drammanuskripto estas literaturo?

*Ljubomir Trifončovski,
Balado pri la luno kaj la cervo.
en la finna kaj la sveda
trad. D-ro Sabira Ståhlberg
en la angla Krys Bottrill,
en la itala Nicolino Rossi
Bambu Ltd, Varna 1998.*

La libro aperis lastjare kiel speciala eldono okaze de la 65-a Internacia PEN-kongreso en Helsinko. Mi legis ĝin multfoje. Unue mi traktis la temon tro malgranda. Sed dum lasta milito kontarŭ serboj, la libro havigis malhelan voĉon. Ĉu ni povas travivi legante libron la suferadon de militviktimoj? Ĉu ni povas kompreni la vivon de malvenkintoj ĉi tie en Finnlando? Kion pensas krimulo, kiam policistoj ĉasas lin/ŝin kiel cervon en la balado? Kian suferadon travivas psike malasana persono, kiam ambulanco alvenas ĉe lia/ŝia pordo por veturigi la malsanulon al hospitalo? Ĉu ni povas imagi kiel sentiĝas esti ĉasita kiel besto?

La "Balado pri la luno kaj la cervo" havas komunajn trajtojn kun aliaj baladoj, ekzemple tiuj de Goethe kaj Schiller same kiel speciale kun tn. popolaj baladoj. La cervo kaj la luno povas paroli, nenion alian supernaturan havas la versdrameto. Kiel "Der Erlkönig" de Johann Ludwig von Goethe rakontas la balado de Trifončovski pri emocie moviga morto de la protagonisto. Ekzistas baladoperoj, eble balad-dramoj, sed la plej konvena formo por balado estas versoj. Mia opinio la balado de Trifončovski estas versdrameto, speciale tion oni vidas el la esperantlingva originalo en la komenco de la libreto.

La recenzisto de la Revuo "Esperanto" opiniis, ke la "Balado pri la luno kaj cervo" ne estas bona literaturo. Leginte manuskripton por versdrameto oni ne povas diri ion pri preta dramo. La vivhistorio de karisma(j) aktoro(j) donas ion novan al manuskripto, tre serĉema reĝisoro trovas novajn detalojn al manuskripto, bona publiko povas instigi la ensemblon al nekredbla sukceso. Mi persone opinias, ke "Balado pri luno kaj cervo" estas tre bona manuskripto por radiodramigo. Per voĉaj efektoj, ĝi farus magian influon al aŭskultanto.

AR

Ĉu estonta proverbartrezoro?

*Erkki Röntynen,
Proverbaro – Nia Komuna Heredaĵo.
Redaktis kaj tradukis Erkki ja Aira Röntynen,
Desegnaĵoj Anne-Mari Orava,
Presejo de la Universitato en Oulu 1999.*

La Röntynen-proverbaro estas bona daŭrigo al finnaj E-publikigaĵoj. La etajn skriberarojn en la memeldono la kompilinto promesas korekti en estonta dua eldono. La Proverbaro de familio Röntynen kondukis miajn pensojn al mia komencantperiodo kaj al la Proverbaro Esperanta de Zamenhof. Kiel komencanto mi legis proverbarojn ne nur en Esperanto sed ankaŭ en la finna kaj angla. Mi ŝatis tiun ĝenron, ĉar mi pensis ke ĝi povus instrui al mi ekzaktecon de esprimo kaj manieron verki pri plej multaj aferoj ekonomike, t.e. mal-longe. Kiel komencanta verkanto mi verkis eĉ aforismojn, kiuj estis legitaj en programero por verkantoj en Radio Jyväskylä. Mi pen-

sas ke pro verkadinstruaj celoj ĉiutipaj proverbaroj estas bonvenaj en nian literaturon.

Proverbaron Esperantan Zamenhofan la kompilinto faris kiel la katedralon de Köln. L. L. Zamenhof ricevis de sia patro Marko kolekton da proverboj kiun la antaŭa tradukis unue en plurajn naciajn lingvojn kaj fine en Esperanton. La plej grava eraro de la proverbaro Zamenhofa estas tio, ke la kompilinto ne indikis fontojn. En proverbaro de Erkki Röntynen estas atentita ekzakte la fontoj. Iom min mirigis la maniero de kompilinto ne fini la proverbon per punkto, sed li daŭrigas per fontindiko kurziva, ekzemple ”Serpento sepentidojn vartas *Irano*”

Unu popolnomon mi ankaŭ miris, tiu estas la komooj/Rusio. Eble la kompilinto celas la Komi Aŭtonoman Respublikon en Rusio. Ĉu komioj estus pli konvena nomo por tiu popolo? La verko estas bele ilustrita kaj vekas intereson de potenciala leganto. El Proverbaro de familio Röntynen iĝas bona daŭrigo al finnlanda E-literaturo, kiu bedaŭrinde por jardeko havas silenton. Estus gravaj verkoj en la finna literaturo ĉi-tiujarcenta, kiuj atendas sian esperantigonton. Eble la memeldono de Röntynen-proverbaro estus signo por aliaj eldonontoj.

AR

Mielenkiintoista maailman kielistä

*Jaakko Anhava,
Maailman kielet ja kielikunnat.
Gaudeamus
Tampere 1998.
ISBN 951-662-734-X*

Monet kieltenopiskelijat tutustuvat perusopinnoissaan Jaakko Anhavan ‘Maailman kielet ja kielikunnat’ -teokseen, joka on uudistettu versio Aulis J. Joen ‘Maailman kielet’-teoksesta (1. p. 1966). Anhava on laajentanut Euraasian kielten esittelyä, uusia ovat pidgin- ja kreolikielten sekä kansainvälisten apukielten esittelyt sekä katsaus viittomakieleihin. Kaksi viimeistä katsotaan kielitypologiassa rajatapauksiin.

Anhavan teoksesta löytyy virallinen suomalainen nimi myös tuntemattomille maailman kielille. Niitä ei välttämättä löydä uusimmistakaan tietosanakirjoista.

Siinä on kartat, joten kielen puhunta-alue voidaan tarkentaa. Kirjassa on myös hyvä johdanto kielitypologiaan ja kielihistoriaan, niinpä se toimii oivana johdattajana kielitieteellisten ongelmien pohtimiseen.

Kappaleessa ‘Keinotekoiset apukielet’ on muutaman sivun johdatus keinotekoiisiin kielisiin, sekä apriorisiin että aposteriorisiin. Kannattaa lukea tämä kappale johdantona, jos aikoo tutustua Umberto Econ teokseen “La serĉado de la perfekta lingvo”, joka on ilman esitietoja niin vaikea että sen lukemiseen kuluu useita kuukausia ilman niitä. Tähän kappaleeseen on tiivistetty samat tiedot kuin Econkin kirjassa.

Tässä kappaleessa on myös hyvä esitys esperantosta ja sen yli 110-vuotisesta historiasta kansanliikkeenä. Sitä voi käyttää esperanto-esitteiden hyvänä taustamateriaalina. Anhava tosin suhtautuu melko skeptisesti esperanton mahdollisuuksiin yleisenä toisena kielenä kaikille, mutta esperanto-osuudesta voi aistia melkoisen vakuuttumisen esimerkiksi esperantoksi julkaistun kirjallisuuden edessä.

AR

Viveca ekspozicio pri malnovaj metioj

En Loreno, Francio troveblas ekologia vilaĝo Azannes, kie ĉiujare okazas ekspozicio pri la metioj de la 19a jarcento. En majo kvar cent libervolaj “metiistoj” ĉiudimanĉe vestas sin laŭ pasintaj modoj kaj laboradas de mateno ĝis vespero. Ili montras, kiel iliaj geavoj vivis kaj laboregis en la kamparo.

Viro kaj virino faras brikojn el argilo por tegmentoj. Ĉiu briko estas metita sur la femuro de la virino por havi la bezonatan rondan formon, kaj ŝi kaj li ŝercadas inter la fakecaj klarigoj pri la metio, dum vizitantoj fotadas kaj aŭskultas kun granda intereso. Aliloke du-tri viroj segas plankojn el trunko per grandega, vertikala segilo. Alte sur la trunko staras ĉ. 12-jara knabo kaj helpas la segistojn.

Ĉe la bordo de lageto knabinetoj lavas tolaĵojn, kaj en apuda laborejo juna virino faras sapon laŭ la metodo, kiu estis uzata ankaŭ en finnlanda kamparo ĝis la 1950aj jaroj. Ĉu vi ŝatus vidi, kiel estas buĉita porkego kaj kiel oni rostas ĝin sur fajro? Aŭ ĉu interesas vin kolorigado de lanaj fadenoj per vegetaĵoj? Ĉu interesas vin ŝpinado, gladado per malnovaj gladiloj, teksado? Ĉu vi volas vidi, kiel libroj estis binditaj antaŭ cent jaroj? Aŭ ĉu malnovaj vapormaŝinoj kaj traktoroj allogas vin? Eble vin amuzus rigardi friziston aranĝi la hararon de belulino de la antaŭa jarcento? Ĉu vi havas tempon rigardi bakistojn, kiuj faras kaj bakas panon kaj tortojn en fornoj hejtitaj per ligno? Ĉu interesas vin boato kiu falĉas algojn aŭ bela malnova karuselo, kie infanoj rajdas ĉevalojn kaj sovaĝajn bestojn

kaj aŭdeblas fuormelodioj de la pasintaj jardekoj?

Ne nur adoltoj kaj gemaljunuloj montras sian lertecon sed ankaŭ geknaboj kaj infanoj helpadas kaj lernas. En muzea klasĉambro la junaj gelearnantoj zorgeme kopias la tekston donitan de la “instruistino”. Zorgeme ili eninkigas siajn lignajn skribilojn (kun ŝtalplumo) en la botelo sur la pupitro. Vizitantoj



gapadas malantaŭ vitra ŝirmilo, sed la infanoj ne rigardas ilin sed siajn kajerojn. Sur la nigra tabulo legeblas iu aforismo bele skribita de la instruistino.

En ĝardeneto oni povas konatiĝi kun kuracaj plantoj kaj spicaj herboj. Ĉiu planto havas nomŝildon en la franca kaj latina. Ĉe la abeluoj iu klarigas la bredadon de abeloj kaj la produktadon de mielo. Eblas vidi jungitajn bovinojn plugi kampon aŭ falĉi fojnon. Ĉevalido apud sia patrino deziras suĉi lakton. Ŝafaro timetas en la ejo, kie oni tondas ilin. Kun brilantaj okuloj knabeto ridetas, kiam granda bruna koko estas metita sur liajn brakojn kaj li povas karesi la birdon, kiu reprezentas iun francan piedpilk-teamon...



Miloj da homoj venas al tiu ĉi viveca ekspozicio. Je alta prezo ili aĉetas la panon bakitan surloke, la kolbasojn, konfitaĵojn, vinojn, fruktosukojn kaj aliajn produktaĵojn de la entreprenistoj de la ĉirkaŭo. Ili tagmanĝas en provizora restoracio ĉe provizoraj tablegoj kaj sur longegaj benkoj. Folkloraj muzikistoj amuzas ilin per kanzonoj. La vastegan parkojon sur fojnkampo prizorgas libervolaj “policanoj”. La multeco de la vizitantoj similas finnlandan someran kunvenon de lestadianoj. Ĉio iras glate kaj bonhumore. Nur la rubujoj tro rapide pleniĝas kaj ne eblas apartigi vitraĵojn, ladujojn, plaston, paperon kaj kompostaĵojn. Eble la belega vetero logas pli da homoj ol estis atendite. La “ekologia idealo” ne plene realiĝas. Ne venas nur francoj, sed ankaŭ svisoj, germanoj, belgoj, nederlandanoj kaj eĉ du finnoj venis la 16an de majo.

Francoj ne hontas pro la simpla vivo de la kamparanoj en la pasinta jarcento. Kontraŭe! Ili deziras prizorgi sian kulturen heredaĵon, teni ĝin viva, ĝoji pri kaj per ĝi. Ili vendas vidbendojn faritajn pri la vivo de izolitaj maljunaj montaranoj, kiuj ankoraŭ scias, kion oni faris per la malnovegaj iloj kaj kiel oni faris

tiujn ilojn. Estas fotistoj, kiuj fotis la sulkegajn vizaĝojn kaj la ĉifajn vestojn de izolitaj terkultivistoj en la komenco de la 20a jarcento. Nun la fotistoj sukcesas vendi seriojn da bildkartoj, librojn pri la ludoj kaj laboroj de la estinto. Paro da maldikaj varikozaj virinkruroj aŭ fortegaj malgrasaj virbrakoj rakontas pri vivo tute malsimila al tiu de la nunaj ŝminkitaj belulinoj kaj muskolecaj beluloj.

Kial ni finnoj pretas detrui niajn estintaĵojn? Kial ni tiom urĝe klopodas atingi iun modernan eŭropanecon? Kial ni avide rigardas nur antaŭen, rapidas, forgesas niajn radikojn, igas nian kulturon maldika kaj monotona? Kial ni hontas pro nia pasinto kaj volas liberigi nin de ĝi, dum la francoj – kaj supozeble ankaŭ aliaj mezeŭropanoj – jam rimarkis, ke indas kaj endas konservi la pasintaĵojn tute adaptiĝante ankaŭ al la nuno kaj pretiĝante por la futuro?

Saliko



Fondumo Esperanto subvencias altkvalitajn projektojn

Dum la Vintraj tagoj, en la fino de la jarkunveno, Harri Laine prezentis la agadon de Fondumo Esperanto-säätiö. Ĝin fondis en 1955 Vilho kaj Marke Setälä. Ilia donaco formis la bazan kapitalon konsistantan ĉefe el la domo kaj domgrundo ĉe la bone konata adreso Esperantotie 4 en Iirislahti, Espoo.



Harri Laine.

Dum la vivo de doktoro Setälä la fondumo aktivis ankaŭ komerce: ĝi havis librovend-ejon kaj eldonis esperantan literaturon. Ĝiaj plej bone konataj libroj certe estas la esperanta *Kalevala* (1964) kaj *Privilegia Vojo al Lingvoscio* (unua eldono 1958), la furora, multfoje reeldonita internacia lernolibro de V. Setälä.

Nuntempe la fondumo ne plu havas komercan aktivadon: la domgrundo estis vendita, kaj la mono tiel ricevita (1,5 milionoj) estas la nuna bazo de ĝia agado. La kapitalo estas sekure investita, kiel postulas la fonduma statuto, kaj parto de la rentumoj estas uzebla por subvencii la movadon.

Laŭ sia statuto la fondumo subtenas agadon por diskonigi, lerni kaj uzi la internacian lingvon, unuavice per mona helpo al organizaĵoj kaj individuoj.

La estraron de la fondumo longe prezidis Simo Raumavirta. En la aŭtuno de 1999 li volis fordoni la taskon kaj Harri Laine estis elektita nova prezidanto, dum Raumavirta restas vicprezidanto. La aliaj estraranoj estas Jukka Keitele (ekonomia fakulo), Jarkko Laine kaj Jouko Lindstedt.

Fondumo Esperanto serĉas altkvalitajn projektojn por subvencii. Ili havu longedaŭran kaj gravan influon al lernado, disvastigo kaj uzado de Esperanto en Finnlando kaj krome estu realismaj. Tiaj entreprenoj ne ĉiam estas facile troveblaj. Malgrandaj subvencioj povas esti konsiderataj laŭ malpli striktaj kriterioj, sed la estraro ĉiuokaze celas reale antaŭenigi la lingvon.

AR

Diplomo al Esperantolehti

La skipo de Pola Radio donacis al Esperantolehti diplomon, kies teksto jenas:

Diplomo

Al "Esperantolehti"

Kun dankesprimo pro la ofta kaj bona informado pri la E-elsendoj de Pola Radio. la diplomon atribuis La Esperanto-Redakcio de Radio Polonia.

*Estro de la E-Redakcio
Andrzej Pettyn,
Barbara Pietrzak,
Milada Szwedo
Varsovio
La 12-an de majo 1999*

Mi kiel redaktoro de Esperantolehti dankas al la skipo de Radio Polonia pro ricevita diploma. Ĉiutagaj E-elsendoj de la Radio Polonia estas por malgranda redakcio de Esperantolehti bona laborilo por trovi internacie interesajn finnajn E-novaĵojn, kiuj ne perdus sian aktualecon dum longa procezo el la redakcio al leganto. Radio Polonia kapteblas ĉie en Finnlando kaj ĝiaj programeroj donas pensojn kaj ideojn pri tio, kiuj estas la internaciaj aktualaĵoj ĝuste nun en Esperantio. La diploma pendas kadrita sur la muro en redakcio de Esperantolehti. Mi promesas doni ĝin kiel cirkulanta premio al la redaktoro de Esperantolehti post mi, por ke Esperantolehti ne forgesu tiel gravan ilon en farado de E-periodaĵo kiel estas la ĉiutagaj elsendoj de Radio Polonia.

AR

Kunlaboro de pola kaj finna lernejoj

La 6-an kaj la 7-an de junio per la ret-radio Pola Radio aŭdigis intervjuon kun Jorma Ahomäki el Piispanristi (Finnlando) pri la kunlaboro inter Kultur-centro de Milanówek kaj lernejo de Piispanristi en la suda Finnlando. Temas pri interŝanĝo de infandeseĝnaĵoj. La interŝanĝo efektiviĝis per Esperanto.

La finna ekspozicio funkciis en Milanówek dum la tuta majo, aliflanke la ekspozicio de la desegnaĵoj de polaj infanoj same en majo estis prezentita en la lernejo de Piispanristi. Poste oni montros ĝin en Hyvinkää – suda Finnlando.

En Milanówek ĉi-monate, nome la 20-an de junio oni malfermos grandan ekspozicion de infandeseĝnaĵoj el 19 landoj. Temas pri ĉ. 400 desegnaĵoj, pentraĵoj kaj aliaj artaĵoj je la komuna titolo "Mia malgranda patrujo". Ĝi ankaŭ realiĝis per Esperanto.

A. Pettyn

Ne forgesu

Ĉu vi jam defiis iun esperantiston al Sävallahja? Se vi mem ne kutimas aŭskulti la elsendaĵon, tamen partoprenu, ĉar plej multe gravas impresi ne-esperantistaron.

Anna-Liisa Ali-Simola

Ankaŭ memoru la finnajn somerajn kursojn en Tampere. Rigardu iliajn programojn en la aprila numero de Esperantolehti!

TEJO-seminario en Strasburgo, Francio

“Internaciismo kaj naciismo – ĉu konfliktaĵ aŭ kompletigaj ideoj?” 24-31. oktobro 1999 en Eŭropa Junulara Centro de Konsilio de Eŭropo.

TEJO organizas seminarion kunlabore kun la Eŭropa Junulara Centro de la Konsilio de Eŭropo. La seminario sekvas kelkajn principojn de la EJC, interalie:

- ◆ Multnacia preparteamo kaj partoprenantaro (kun geografia kaj seksa ekvilibro);
- ◆ Pritrakto de grava temo de la nuntempa socio;
- ◆ Interkultura edukado kaj aktiva partopreno de la partoprenantoj;
- ◆ Ligo al la baza longtempa strategio de la organizo (TEJO).

La seminario havas propran kuratoron de la eduka teamo de la EJC. Tiu diversmaniere subtenas la organizan teamon antaŭ kaj dum la seminario.

La ĉefa celgrupo estas Individuaj membroj de TEJO loĝantaj en Eŭropo. La partoprenantoj ne nepre havu specialajn konojn pri la temo sed oni atendas ke ĉiuj aktive partoprenu la teman programon. Entute estas 35 lokoj. La kotizo estas nur 280 FRF (francaj frankoj). La limdato por aliĝi estas la 10-a de septembro.

Petu aliĝilon kaj pliajn informojn de: Grigorij L. Arosjev: 117071 a/ja 31, Moskvo, Rusio. Tel: +7-095-4761472; rete: arosjev@fnmail.com.

Pola Radio

